S. Hršel — Hradec Králové, mluví o významu využívání filmu s esperantskou verzí; doporučuje větší propagaci již vydaných filmů, a nejen mezi esperantisty, ale i ostatní veřejnosti — využívat více tisku, rozhlasu a dalších inform. činitelů.

S. Římský — Olomouc: esperantisté potřebují dobrou gramatiku, vypracovanou z našeho hlediska, avšak na základě Fundamenta, jež bohužel nevlastní — doporučuje obstarat několik výtisků. Gramatiku by byl ochoten zpracovat, bude-li mít potřebné podklady.

S. Čambál — zaujal stanovisko k některým diskusním příspěvkům a diskusi zakončil. — Stručné hodnocení diskuse provedl předseda s. Sviták. Zodpověděl některé diskusní příspěvky, poděkoval všem EK za spolupráci, zvláště spoluuspořadatelům konference z EK při PKO Olomouc a jménem ČSEV blahopřál všem delegátům do nového roku 1966.

Závěrečné slovo přednesl s. Vl. Stein, zástupce OÚ, který zhodnotil průběh konference, podnítil k další cílevědomé práci; doporučil vycházet z dosavadních dobrých zkušeností a koncepci esperantské myšlenky a celého hnutí dále rozvíjet v duchu dnešního pokrokového pojetí; rozpracovat teoretické téze vyslovené s. Kníchalem. Odpovídá nakonec na některá vystoupení průběhem konference a přeje úspěchy do další činnosti.

U s n e s e n í :

Návrhová komise přednesla návrh na usnesení, který byl po drobných připomínkách a dodatcích jednomyslně schválen. Účastníci konference pak ještě schválili návrh pozdravných dopisů: ÚV KSČ, ministru školství a kultury s. dr. Hájkovi; pracovníkům V. odboru MŠK, Gen. sekretáři OSN U Thantovi; řediteli OÚ s. Křížkovi, pracovníkům I. odd. OÚ.

Pracovní plán čs. esperantského výboru na rok 1966

Hlavní úkoly ČSEV a kroužků:

a) Účinná propagace esperanta a jeho cílů v řadách našich občanů — tato činnost bude zaměřena více do závodů, společenských a zájmových organizací; do institucí, jež jsou ve styku se zahraničními partnery a podobnými útvary.

b) Další rozvíjení a prohlubování jazykových znalostí, výchovy kvalifikovaných a všestranně vzdělaných učitelů esperanta (po stránce jazykové, z hlediska znalostí mezinár. vztahů, příčin rozporů ve světě — ideologicky na výši a pod.). Konání jazykových a všeobecně vzdělávacích kursů a seminářů k cílevědomé výchově schopných propagátorů esperanta jako důležitého společenského jevu pro rozvoj a pokrok společnosti a pro upevňování a rozvíjení dobrých mezinárodních vztahů.

c) Vytvářet dále podmínky k začlenění všech esperantistů, kteří dosud stojí stranou od jednotlivých kroužků a klubů, a získat je pro aktivní činnost v esperantském hnutí. Organizovat kategorii členů — přátel esperanta.

d) Pokračovat v započatém navazování praktické spolupráce a vzájemné pomoci s celostátními esp. organizacemi v sousedních, zvláště pak v socialistických státech.

e) Esperantské hnutí a jeho jazyk dát více než dosud do služeb pokroku, kultury, míru — do služeb naší socialistické společnosti tím, že budeme získávat další přátele naší vlasti ve světě, že promyšlenou seriózní informační činností budeme seznamovat zahraniční esperantisty s úsilím a cíly našeho lidu při výstavbě naší republiky, touze po míru a přátelství se všemi národy světa.

f) Přesvědčit všechny naše esperantisty a získat je k tomu, aby jako nositelé myšlenky míru a vzájemného přátelství mezi národy projeví tuto skutečnost také prakticky a stali se členy Světového esperantského hnutí — čs. sekce MEM při ČSEV.

NOVA KATALOGO DE ESPERANTAJ POŝTSTAMPOJ

(Grava por filatelistoj!)

Filatelistoj, kiuj kolektas Esperantajn filatelaĵojn, jam delonge atendis novan katalogon de Esperantaj poŝtstampoj kaj poŝtmarkoj.

La unuan katalogon sub la titolo „Resumo de provkatalogo pri Esperantaj poŝtstampoj uzitaj en la tuta mondo”, verkitan de s-ano Werner Simon el Usono kaj s-ano Gaston Saget el Francujo, eldonis en la jaro 1954, Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. La katalogo enhavis ĉiujn Esperantajn poŝtstampojn ekde la jaro 1912 ĝis 1953.

De tiu tempo pasis jam 12 jaroj kaj la nombro de la Esperantaj poŝtstampoj intertempe preskaŭ duobliĝis. Pro tio oni devis pensi pri nova katalogo, kiun nun prilaboris s-ano Gaston Saget el Francujo kaj s-ano Alojzy Wenclewski el Pollando. Eldonis ĝin Pola Esperanto-Asocio.

La katalogo ampleksas ĉiujn 254 poŝtstampojn, kiuj aperis ekde la jaro 1912 (ekde la unua Esperanta poŝtstampo aperinta okaze de la 8-a Universala Kongreso en Krakovo) ĝis la jaro 1964 (ĝis la varsovia poŝtstampo okaze de la 105-a datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof).

Ĉiuj poŝtstampoj estas detale priskribitaj. La priskribo entenas la eldonaton, tekston, dimensiojn, uzitan inkon ktp. Ĉe la fino de la katalogo oni trovos la indekson de ĉiuj poŝtstampoj laŭ landnomoj kun resendo al la numeroj. Tio ĉi faciligos la serĉadon de la dezirata stampo. Por kompletigi la temon „Esperanto en filatelo” la aŭtoroj aldonis simplan liston de esperantemaj poŝtmarkoj eldonitaj en diversaj landoj, verkitan laŭlande surbaze de la Yvert-katalogo.

La noveldonita katalogo estas grava helpo en la serioza kaj sistema kolektado de Esp-aj filatelaĵoj. Ĝi estas mendebla ĉe Pola Esperanto-Asocio, Varsovio, Nowy Swiat 27. Prezo 10 zlotoj (5 respondkuponoj aŭ 7,5 steloj, kun sendkostoj).

RADIO PRAG SPRICHT -7 FÜR OESTERREICH

Karaj aŭskultantoj de niaj Esperanto-elsendoj, konsiderante viajn oftajn kaj multnombrajn proponojn koncerne la plioftigon de niaj elsendoj, ni decidis komence de oktobro 1965 plilarĝigi niajn elsendojn. Do vi aŭdos nin dufoje en la monato. La tempo de la elsendoj restis la sama, sekve de kio vi aŭdos nin ĉiun duan ĵaŭdon en la programo de eksterlanda disaŭdigo por Aŭstrio, komenciĝanta ĉiutage je la 18,05 h. kaj daŭranta ĝis la 19-a horo de MT.

La Esperanta elsendo estas envicigita fine de la programo kaj komenciĝas ĉirkaŭ la 18,45 h. La ondo de nia elsendo restis la sama, do 233,3 m (1286 kHz).

Ni scias, ke kelkaj radiostacioj limigis aŭ mallongigis siajn Esperanto-elsendojn. Male Radio Praha plioftigas ilin por plenumi la deziron de siaj aŭskultantoj kaj subteni la noblan ideon de tiuj esperantistoj, kiuj Esperanton dediĉis al servado de paco kaj interkompreniĝo.

Ke tiu ĉi nia provo restu daŭra aranĝo, estas necese, ke ni ricevadu rimarkigojn kaj opiniojn de niaj aŭskultantoj. Estas komprenebla afero, ke neniu Radiostacio en la mondo povas elsendadi programojn nur por kelkaj unuopuloj. Ankaŭ ni kompilas

niajn programojn laŭ la interesoj de niaj aŭskultantoj. Samtempe ni atendas, ke ni ricevados sugestojn por la enhavo de niaj Esperanto-programoj. Skribu al ni, kiel vi nin aŭdas, ĉar tio estas pruvo, ĉu la elsendo plenumas sian celon aŭ ne.

Radio Praha, Disaŭdigo por Aŭstrio,
Esperanto-Elsendo, Ĉeĥoslovakio

NOV-ZELANDO EN LA ETERO

En la kadro de la Jaro de Internacia Kunlaboro, Nov-Zelanda Radio komencis disaŭdigi en Esperanto dekminutan programon de internaciaj novaĵoj, la lastan ĵaŭdon de la monato, je 0830 GMT kaj 1130 GMT; zl 2, 9.54 Mc/s 31.45 m en la 31-a gamo kaj zl ' 7, 6.08 Mc/s, 49.34 metroj en la 48-metra gamo. La programo estas eksperimenta kaj ĝia daŭro dependas de la alvenintaj respondoj, kiujn oni sendadu al jena adreso: New Zealand Broadcasting Corporation; P. O. Box 2396, WELLINGTON C-1, Nov-Zelando.

22-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE T. E. J. O.

okazos la 23-30-an de julio 1966 en Pécs (prononcu Peeĉ kun fermita vokalo „e” — rim. de. la red.) La riĉa programo enhavos interkonatiĝan vesperon, solenan malfermon, ĝeneralan kunvenon, ekskursojn, belartan vesperon, renkontiĝon kun la loka junularo, solenan akcepton de la reprezentantoj de la unuopaj nacioj kaj fine oficialan solenan fermon.

Foto-konkurso en kadro de la 51-a U.F.K en Budapeŝt (30. 7.-6. 8. 1966). La temo de la ĉi-jara Foto-konkurso estas: „Infanoj ne konas limojn”. La konkurso estas dividita en du branĉojn: koloraj diapozitivoj — nigre-blankaj fotoj. Dum la nombro de la diapozitivoj (36X24 mm) estas limigita je 5, la nombro de la nigreblankaj fotoj (13X18 cm) ne estas limigita.

La Foiro de Barcelona jam por la kvina jaro eldonis siajn oficialajn afiŝojn en la Internacia Lingvo. Ili ne estas nur propagandilo por la foiro, sed ankaŭ pri Esperanto. Por plej taŭga distribuado oni decidis dissendi la afiŝojn pere de la delegita reto de UEA. La sendinto petis transdoni la afiŝojn al iu entrepreno kiu havas lokon por elmontri ilin (vendejo, industrio, turisma oficejo, stacidomo ktp.) kaj nun li ŝatus ricevi informojn pri la elmontritaj afiŝoj. En antaŭaj jaroj kelkaj samideanoj sendis eĉ fotografiaĵojn. Ĉar la eldonnombro de la Esperantaj afiŝoj superis tiun de la angla- kaj franc-lingvaj, estas konsilinde dediĉi al la afiŝoj de la Foiro de Barcelona, kiuj estas koloraj kaj belegaj, atenton kaj lokigi ilin konvene kaj sendi informon al jena adreso: Rafael AYALA GOMEZ, delegito de UEA c. Cartagena, 353,6°, la, BARCELÓNA-13, Hispanio.

Vyhodnotene činnosti ČSEV za rok 1955

Zpráva predsedu s. Svitáka na 3. plenárnej schôdzke v Bratislave.

Z činností sekcií (v nich a v esp. krúžkoch musí byť ťažisko konkrétnej činnosti) veľkú aktivitu vykazovala sekcia MEM (Návšteva s. Balagua). Komisia žien a sekcia spisovateľov vydala ďalšie čísla svojich obehovníkov.

Jednanie predsedníctva so zástupcami skupiny mládeže esp. krúžku Praha vyústilo v ustanovenie **sekcie mládeže ČSEV** dňa 9. júla 1965. Predsedníctvo poverilo jej vedením s. Mikuláša Nevana, študenta VŠE, Praha 3, Vinohrady, Horní Stromky 14.

Sekcia železničiarov zaregistrovala už 370 členov a 26. 9. usporiadala v Českej Třebovej ustavujúcu schôdzu dočasného celoštát. pracovného výboru. Z iniciatívy s. arch. Drlíka začala sa živelné rozvíjať akcia na spoluprácu s **IOE T. Sekelja**.

Z letných akcií **aktív esperantistov SMK**, k 20. výročiu oslobodenia v Přerove (dňa 23. 5., 150 účastníkov), mal i navzdory organizačným prekážkam, veľmi dobrú úroveň.

Stretnutie esperantistov v Martine v dňoch 12.-13. 6. bolo spojené s esperantskou výstavou za účasti 50 osôb, už v novom Závodnom klube. Mimo plánu boli ešte dve stretnutia: vo Zvolene a na Sliachi (14.-15. 8. - zástupca s. Čambál) a 25.-26. 9. v Ďudinciach (zástupca s. Hropko). Okrem toho boli ešte niektoré miestne stretnutia a turist. zrazy, ale ČSEV nedostal o nich riadne informácie.

Velmi úspešný priebeh mal **14. letný esperantský tábor v Lančove** oboch 2-týždňových denných kurzoch (18. 7.-14. 8.) za účasti okolo 100 osôb v každom turnuse. Úroveň bola dobrá. Programovým vedúcim bol s. Drah. Kočvara a na záver druhého kurzu tábor navštívil predseda s. Sviták.

Naproti tomu bolo treba odvolať **Letné kolégium esperanta v Sadskej**, ktoré malo byť 18.-31. 7 (EK Poděbrady). Zavinili to isté nedostatky v príprave a nábore, ale hlavne nezaujím. čs. esperantistov, vrátane výborov EK (prihlásilo sa len 12 účastníkov).

(V ďalšom sa spomína **edičná činnosť**: vydanie Zpráv a PACO, náborového listu a knižné publikácie bratislavské). Má vyjsť **Mapa ČSSR** (skladačka) v Orbise, v preklade M. Lukáša. Vyjednáva sa s nakladateľstvom Orbis v Prahe, kde majú vyjsť 2 informačné brožúrky (ČSSR v kostke a 3. vydanie Juĝu mem). V spolupráci s Osvet. ústavom v Prahe a s. red. Knoblochom sa vyjednáva o vydaní publikácie turistického charakteru „Srdce Evropy volá“. V nakladateľstve POFIS sa pripravuje 2. vydanie „Filatelistického slovníka“, teraz už v spolupráci s našimi jazykovými odborníkmi.

Starostlivosťou esp. krúžku znova vyšiel **prospekt mesta Kroměříža**, ale má zas jazykové závady, ďalej prospekt „Frýdek-Místek 700-jara“ a rozmnožená publikácia „Pedagogiko“ od MUDr. Černého, ako i „Dokument z hist. medzinár. reči“ v turist. odbore Kroměříža.

Dobre pokračuje **informačná práca o esp. hnutí u nás**. V dennej i ostatnej tlači a rozhlase darí sa nám sústavná publikácia veľkého množstva správ pre širšiu verejnosť. O návrh na **informačný leták o esperante** požiadame po porade s dr. Pumphom s. J. Kořínkou.

Úplný prehľad esp. publikácií od r. 1960 bol uverejnený v Zprávach. Schválenie **Skúšobného poriadku** sme na MŠK dňa 24. 9. znova prejednávati a budeme ďalej urgovať.

Nedostatočne sa vyvíja práca komisie na rozbor dokladov o esp. hnutí ČSSR pre MŠK. Väčšina poverených pracovníkov si zrejme neuvedomila zásadnú dôležitosť tejto úlohy.

Velmi pekný ohlas malo **prednáškové turné s. Cíchovej po Juhoslávii** (6.-31. 5.), práve tak i **zájazdy železničiarov-delegátov** na sjazde IFEF v Juhoslávii a na Medzinár. sjazde IFEF v Hamare v Nórsku viedli k rozvoju medzinár. spolupráce.

Európska esperantská konferencia vo Viedni. Ako delegát ČSEV sa zúčastnil - i keď s veľkými ťažkosťami - s. Drahomír Kočvara, na vlastný náklad, len s príspevkom od OÚ. Ako turisti, na pozvanie svojich priateľov, bolo na konferencii ďalších 14 čs. esperantistov.

Na 50. U. K. v Tokiu zúčastnili sa s odporúčením ČSEV s. Fiala z Poděbrad a s. Obručová z Olomouca, na svoje trovy a na pozvanie japonských priateľov. Zprávu nepodali. **Jednu z prvých cien v literárnej súťaži** získal pre ČSSR znova Jiří Kořínek z Ústí n/Labem. Viacerí naši esperantisti sa zúčastnili na letných akciách v zahraničí ako v Gyule, Szegede, Primoštene a inde.

Z početných zahraničných návštev v ČSSR prijal ČSEV v dňoch 23-24. 6. organiz. tajomníka JEL Dim. Bjelanoviča z Belehradu, 4.-6. 8. gen. tajomníka MEM A Balagua zo St. Pöltenu, 9. 8. vedúceho severnej oblasti E-organizácie v NDR D. Blankeho z Rostocku, 5.-7. 10. predsedu JEL dr. L. Krausa. S uvedenými funkcionármi sa rokovalo o spolupráci s ČSEV.

La 14-a Somera Esperanto-tendaro 1965 en Lančov

Ĉi-jare - tute escepte - la vetero ne estis tre favora al someraj tendaroj. Pluvis pli multe, ol aĝuloj memoras, kaj la temperaturo ankaŭ ne respondis al aserto de sciencistoj, ke malproksimiĝante de la lasta glaciepoko, ni havas veteron pli kaj pli varman. El multaj tendaroj oni eĉ forkuradis hejmen pro malvarmumo aŭ pro timo antaŭ ĝi.

En tiaj cirkonstancoj montriĝis nur pli evidenta, kiu bonŝanco gvidis la fondintojn de SET antaŭ jaroj al Lančov. Nome, la suda Moravio, ŝirmata kontraŭ la nordaj ventoj, ĝenerale havas je 2-3 °C pli varman veteron ol la aliaj regionoj de nia patrujo. Kaj ĉi-jare ĝuste tiuj 2-3 gradoj estis tre bonvenaj. Ĉar pluvo ĉe 20 °C estas multe pli tolerebla, ol ĉe 17°. Cetere, S-ta Petro havis almenaŭ tiom da kompato al la tendaranoj, ke li igis pluvi plejparte en nokto, kaj la tendoj estis ĝenerale akvorezistaj. Se venis pluvo ankaŭ dum instruhoroj, ĝi ne estis longa, tiel ke el la 72 instruhoroj 90% okazis subĉiele kaj nur la resto sur verando de la kabano aŭ en la plej grandaj tendoj. Por banado, remado kaj ĉiuspecaj sportludoj restis ĉiam sufiĉe da okazo, ĉar la akvotemperaturo en la lago restis ĉiam super 19°C, kaj la floto de la tendaro, konsistanta el du pramboatoj kaj kelke da blovmatracoj, kreskis je forta motorboato por 15 homoj.

El la sportludoj eble la plej ŝatata estis badmintono, kaj preskaŭ ĉiutage dum la

tuta posttagmezo oni vidis 2-5 plumpilkajn (volanojn) en la aero. Sed ankaŭ la retpilka ludplaceto estis preskaŭ daŭre okupita, ĉefe de la gejunuloj. La geknaboj fervore strebis per ŝtono trafi negrandan kvadraton sur la tero el distanco de ĉirkaŭ 5 metroj; kiu trafis per ok ŝtonoj el dek, ricevis grizan bendon (t. n. „kastoron“) de bontrafo. Tiukaze ni devas aldoni, ke tiu distingilo ne estis sola: estis eble atingi ankoraŭ aliajn ok „kastorojn“ de diversaj koloroj: verdan, se oni eltenis la tutan tagnokton paroli nur esperantlingve; arĝentan, se oni tion eltenis dum tri tagoj sinsekve. La flavan rubandon de lerteco ricevis tiu, kiu prezentis al la estraro ian produkton de siaj manoj, ne gravis, ĉu ĝi estis iam adaptita naturartaĵo, transportebla seĝeto aŭ plibonigita ŝtuparo al la lavejo. Ĉefe se ĝi dokumentis, ke la manoj ĝin farintaj estis lertaj — kaj diligentaj. Plue estis tie „kastoroj“ de naĝado, kaj aliaj; ĉi-jare estis enkondukitaj du novaj, nome tiu de plantkono kaj tiu de fungo-kono. Tiujn oni atingis post rigora ekzameno ĉe konstanta ekspozicio de plantoj kaj fungoj, kiun aranĝis s-ano Hlaváč el Plzeň, nomata ankaŭ Leontodo.

Laŭ la karaktero de tiuj ĉi „ĉasaĵoj“ oni jam vidas, ke la plejparto de la tendaronoj estis junularo. Kaj estas ankaŭ la plej granda merito de la organizintoj, ke dank' al siaj spertoj kaj inventemo ili scipovis allogi la junularon daŭre al ludoj, kiuj preskaŭ senĉese okupis alterne ilian korpon kaj animon, sed neniam transpaŝis la limon de amuzo. Do, vera „schola ludus“, pli efike omaĝanta la memoron de J. A. Comenius ol iu ajn monumento. — Kaj kredu, ke ankaŭ plenkreskuloj, ja eĉ tiuj pli frue naskiĝintaj, volonte aliĝis al la konkurado, vidante sur maniko de dekjara knabo ĉiujn naŭ multkolorajn bendojn.

La kultura programo estis riĉigita per ekskursoj al la kasteloj Vranov, Bítov, Jaroměřice, Náměšť; oni vizitis la bazilikon kaj naskiĝdomon de B. Šmeral en Třebíč ktp. Je invito de la najbara junpionira tendaro oni tie prezentis kaj instruis kelke da Esperantaj kantoj, prelegis pri Esperanto kaj pri vojaĝo en Francio, kio ĉio vekis sinceran intereson ĉe la infanoj.

Iom malpli pretendeman nivelon havis la vesperaj tendarfajroj. Ĉe ili krom serioza rakontado pri la viena kongreso (D-ro Horský, D. Kočvara), krom gajaj kaj spritaj programeroj okazis ankaŭ ludoj malpli intelektulaj. Tia estis ekzemple la ludo „gorilo“, kies interna (bedaŭrinde ĝis 2 km perfekte aŭdebla) ideo estas, kriegigi ĉiujn partoprenantojn ĝis raŭkiĝo. Sed mirinde ĝuste tiaj ludoj estis la plej ŝatataj de la infanoj (kaj ne sole de ili) verŝajne kiel aktiva malstreĉo kaj reago al la gaja, sed tamen racia tagpasigo.

Simile malracian celon havis la „Karnavalo“, suna dimanĉa posttagmezo, dediĉita al alivestado en plej sensencajn kostumojn, kiujn la individua fantazio povis elpensi el littukoj, kovriloj, kano, foliaro ktp. Oni sin farbis per lipruĝo, dentpasta, ja per argilo kiel indianoj sur pado de la militiro, kaj oni estis — laŭ la junulara slango — feliĉaj kiel testudoj. Verŝajne ankaŭ reago al la iom monotona vestaĵo ĉiutaga, nome la bankostumo aŭ sport- kalsono.

Kaj nun ion pri la instruprogramo. Kiel ĉiujare, la tendaro estis aranĝita en du etapoj po 14 tagoj, en la dua duono de julio kaj la unua de aŭgusto. La unuan etapon partoprenis entute 115 homoj, la duan 90, inkluzive 13 gvidantojn kaj instruistojn, kaj 3 kuiristinojn. Kiel jam dirite, la plej granda parto estis junularo.

La instruado mem okazis en ses, resp. sep kursoj laŭ progresinteco: tri

A-kursoj, du B-kursoj kaj unu C; en la unua etapo ankaŭ unu D-kurso por estontaj instruistoj. Kursoj A kaj B okazis laŭ la lernolibro de Th. Kilián, kiu mem ankaŭ la tendaron vizitis. Preskaŭ ĉiuj gelernantoj sukcese plenumis la ekzamenon, dank' al tio, ke la konkuremo kaj ĉifoje ankaŭ la vetero puŝis la tendaranojn al lernado, ĉefe en la lastaj tagoj antaŭ la ekzamenoj. Tiurilate tendaro kun firma laborplano havas grandan avantaĝon kontraŭ tendaro nur amuza: oni neniam enuas, kaj eĉ pluvo kontribuas certgrade al la fina sukceso. Al ĝi kontribuis ankaŭ la partopreno de kelkaj eksterlandanoj: unu polino, unu bulgarino, du germanoj, unu hungara familio kaj unu francino. Ĉar neniu el ili komprenis eĉ unu ĉeĥan vorton, oni klopodis paroli kun ili esperant-lingve kaj liberigis sin tiamaniere de la bone konata paroltimo de komencantoj.

La manĝaĵo, kiel ĉiam antaŭe, estis simpla, sed bongusta kaj sufiĉa.

Ne estus dece el la vico de sinoferemaj gesamideanoj, kiuj per sia laboro kaj klopodo ebligis la aranĝon kaj sukceson de la tendaro, ne nomi almenaŭ la jenajn: P. Sittauer, J. Habeš kaj Fr. Sedláček, ĉiuj el Třebíč, kaj D. Kočvara el Ostrava.

La Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato, sub kies egido la someraj Esperanto-tendaroj ekde ĉi tiu jaro staras, elsendis sian prezidanton, Fr. Sviták,- viziti la tendaron. Ĉe vespera tendarfajro li gratulis en la nomo de ĈSEK al ĉiuj, kontribuis al la fondo kaj perfektigo de SET, kaj memorigis la tendaranojn pri ilia granda tasko, ne nur ellerni bone Esperanton, sed ankaŭ utiligi ĝin por disvastigo de la ideoj de progreso, paco kaj socialismo.

Venontjare ambaŭ etapoj de SET okazos en Julio, por ne koincidi kun la tutmonda Esperanto-kongreso en Budapeŝto.

Do, ĝis revido en SET 1966 komence de Julio, por ke niaj partoprenontoj de la budapeŝta kongreso estu perfekte ekipitaj, almenaŭ lingve!

Felix.

„KULTURAJ KAJEROJ”

Se vi interesiĝas pri la revuo, pluajn ingormojn donos al vi: Dezider Koronci, Nábřežie Metóda 1707/16, Prievidza, Stredoslovenský kraj.

„**Sileziajn kantojn**” de Petr Bezruč, oni intencas venontjare eldoni en kompleta traduko, sed tio povos sukcesi nur tiam, se estos sufiĉa resonado el eksterlando pri la nun eldonita broŝureto pri P. Bezruč. Petu pluajn ekz. de Památník Petra Bezruče, Ostrožná ul. OPAVA. Ne forgesu!

Ĉu vi deziras Esperantajn bildkartojn? Antaŭmendu ĉe Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, Blanická 4, Praha-12, Vinohrady.

Uĉebnice esperanta od Th. Kiliana, možno dostat priamo, i na objednávki poŝtou, v predajni KNIHA n. p., Štěpánská 42, PRAHA-1.

Podpisová akcia UEA predlžená do 31. júla 1966! Zbierajte hlavne individ. podpisy!

DENOVE ESPERANTO EN LA SVISA RADIO

La Svisa Kurtonda Radiostacio, kiu bedaŭrinde devis komence de 1965

interrompi siajn Esperanto-elsendojn, tradiciajn jam depost 1946, ekde la 7-a de novembro 1965 denove elsendas en la Lingvo Internacia. Parolistoj estas la samaj kiel antaŭe, nome D-ro Arthur Baur, ĉefredaktoro en Bern, kaj Claude Gacond, instruisto en La Sagne (Neuchâtel).

La elsendoj okazas laŭ jena plano:

Lunde 12.00 (horo de Greenwich) — Baur. Merkrede 12.00 — Gacond. Ĵaŭde 21.15 (ripeto de la lunda elsendo). Sabate 21.15 (ripeto de la merkred).

La ondoj estas 48,31 kaj 31,46 m. Tagmeze krome ankaŭ 13,94, vespere ankaŭ 25,61 m. La daŭro de la elsendoj estas maksimume 8 minutoj.

La direkcio de la studio dankas al ĉiuj antaŭaj aŭskultintoj, kiuj bonvolis esprimi sian opinion pri la ĝisnunaj elsendoj kaj pri la interrompo. Ĝi petas ilin ankaŭ estonte konfirmi la ricevon de la elsendoj kaj diri siajn kritikajn rimarkigojn. Ĉiu korespondanto ricevados regule la ilustritan send-programon, kiu aperas dufoje en la jaro. La adreso:

Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-fako, Giacometti- str. 1, 3000 BERN 16, Svislando.

Sborník technických prací ZVÚ — vydalo Oborové středisko vědeckých, technických a ekonomických informací Závodů Vítězného února, n. p. v Hradci Králové k mezinárodnímu kongresu chemického inženýrství, strojnictví a automatizace -ChiSA 1965. Nákl. 1000 výtł., form. 21 X 30 cm.

ZVÚ v Hradci Král. vydaly tento obsažný, krásně vypravený sborník pro potřebu mezinárodní a proto na konci každého popisu je resumé v šesti řečech, mezi nimiž je i esp-o. Překlady jsou výborné a pro odborníky, jimž je sborník určen, dokumentují naprostou schopnost esperanta tlumočit technické texty. Překlad, jakož i jeho publikace, jsou zásluhou Zdeňka Hršela. Doufejme, že pro příště si tiskárna opatří esperantské háčky.

Fx

60—a datreveno de UEK

(La Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer-en 1905)

El la revuo „L' Esperantiste", oktobro 1905,

laŭ la francaj „Kulturaj Kajeroj."

„Dum en Boulogne S-ro Michaux kaj liaj sindonaj kunlaborantoj rapidis fini la preparon de la kongreso, Dro Zamenhof vojaĝinte tra Germanujo alvenis Parizon kaj ekloĝis ĉe sia amiko kaj kolego Dro Javal, membro de la medicina Akademio, tiel ŝatata pro lia sciado, kiel pro lia granda afableco. „Lingvo Internacia" de la 15-a de Aŭgusto raportas, kiel akompanata de Generalo Sebert, Dro Javal kaj Sro Bourlet, Dro Zamenhof estis akceptita de Sro Bienvenu-Martin, Ministro de l'publika Instruado; poste de Sro Bellan, sindikato de la Pariza urbeŝtaro. La 30-an de Julio, li prezidis la disdonadon de premioj al la lernantoj de esperantaj kursoj en Parizo kaj ĉirkaŭaĵo. Poste li akceptis kelkajn esperantistojn kaj vizitadis la urbon, ne forgesante la Esperantan Presejon, kie li estis akceptita de Sro Cart. La ĉefaj gazetoj raportis pri

la diversaj faktoj kaj poste pri la grava novaĵo, kiu ĝojigas kaj fierigas nin pro nia Majstro kaj pro la afero Esperanto: Dro Zamenhof ordenita Kavaliro de la Honora Legio.

En Boulogne Dro Zamenhof prezidis la kongreson, sed estis helpata en tiu tasko de kvin vicprezidantoj: Sro Boirac, Generalo Sebert, Sro Michaux, Kolonelo Pollen (anglo), Dro Mybs (germano), kun, kiel sekretarioj, Grabowski (ruso) kaj Kühnl (bohemo). Li ankaŭ invitis kelkajn reprezentantojn de diversaj nacioj por ilin helpi per siaj konsiloj. Unu el la plej gravaj farotaĵoj de la kongreso, laŭ la opinio de Dro Zamenhof estis la alpreno de „fundamenta deklaro” por ĉiuj esperantistoj. Alia tre grava afero estis la elekto de Komitato, kiu povos (ĉiam sub prezido de Dro Zamenhof) esprimi sian opinion pri ĉiuj dubaj punktoj de la lingvo. Pri la interkompreniĝo, tiuj kunvenoj estis plej interesaj kaj kontentigaj. Ĉu en la kunsidoj, ĉu dum la festenoj kaj en la balo, ĉu dum la promenadoj, la dekdu centoj da kongresanoj venintaj de dudek diversaj landoj, ĉie kaj ĉiam plej facile interparoladis. Dum la kongreso kelkaj apartaj kunvenoj okazis interalie por stenografistoj, por katolikoj, por framasonoj, por instruistoj kaj por la esperantistaj gazetoj ĉeestantaj en la kongreso. Dro Zamenhof kelkafoje esprimis sian kontentecon pro la atingita rezultato, kaj la multaj aklamoj, kiujn li kaj S-ino Zamenhof ricevis, povis konvinki lin pri la tute respekta kaj ama sento de la ĉeestantaro. La kongresanoj ankaŭ certe tre longe rememoros pri tiuj agrablaj tagoj, dum kiuj tiom da amikecoj ekformitaj per korespondado povis pleniĝi parole kaj vide.

La festoj de la Kongreso estis belegaj kaj plenaj je nerakontebla entuziasmo. La Boulogne-a Grupo kun la helpo de la urbestro kaj de la Komerca Ĉambro ilin organizis en supera maniero. Unue, la 5-an vespere, okazis la malfermo, ĉe la granda teatro, kiu estis por la cirkonstanco speciale ornamita . . .

. . . Fine parolado de Dro Zamenhof. Ĉe la momento kiam la Doktoro leviĝis, elmontriĝis nedirebla entuziasmo. Kiam kvieteco refariĝis, la Doktoro legas sian paroladon. Li dankas la urbestron pro la akcepto, kiun li ricevis de la Ministro de la publika instruado kaj de la prezidanto de la urba konsilantaro en Parizo. La akcepto, kiun li ricevis en Boulogne, la simpatio, kiu lin ĉirkaŭas, tuŝas lian koron. Neniam li forgesos tiun ĉi vesperon. Li montras la neceson de helpa lingvo internacia neŭtrala, kaj rememorigas, ke antaŭ li aliaj batalis por tiu ĉi ideo. Li ne dubas pri la fina sukceso kaj li finas per tre bela versaĵo: „Preĝo sub la verda standardo” . . .

. . . La plej pruvdona eksperimento certe estis la Molier-a komedio „Edziĝo kontraŭvola” tradukita de Sro Dufeutel. Tiu ĉi komedio ludita kun belega viveco kaj perfekta natureco, estis aŭskultata kun la plej granda intereso de milo da esperantistoj venintaj el ĉiuj partoj de Eŭropo kaj tre facile komprenita de ĉiuj, kiel montris unuanimaj aplaŭdoj ĉe la ĉefaj lokoj. Kaj tion ĉi bone rimarku: nenia sentebla diferenco en la elparolado; oni pensus, ke ĉiuj aktoroj estis kune nutritaj, ke esperanto estas ilia gepatra lingvo, ke neniam ili parolis alian. Nu, la roloj estis ludataj de Italino, Svedino, Rusino, de tri Francoj, de Anglo, Belgo, Germano, Norvego, kiuj, krom du aŭ tri, neniam estis vidintaj unu la alian kaj povis sin antaŭe ekzercadi nur fojon. Ni ne bezonas diri, ke en tiaj kondiĉoj la prezentado faris sur la vidantoj impreson profundan, nedetruieblan.”

El la agado de niaj ronletoj

Esperanto-rondeto ĉe Muzeo de Slovaka Nacia Revolucio en Banská Bystrica estis fondita la 6-an de decembro 1965. Ĝi antaŭ ĉio aranĝos kurson kaj ekkontaktiĝos skribe kaj persone kun pli progresintaj rondetoj por akiri spertojn; krome ĝi ekkorespondos kun eksterlandaj E-kluboj kaj unuopuloj por diskonigi la porpacan signifon de la Lingvo internacia; por doni informojn pri la Slovaka Nacia Revolucio kaj por povi doni klarigojn al eksterlandaj vizitantoj de la Muzeo. — La rondet-kunvenoj okazas ĉiumerkrede ekde la 16-a horo en la Muzeo.

Esperanto-klubo ĉe Parko de Kulturo kaj Ripozo en Brno eldonadas informan bultenon por sia membraro, sed bedaŭrinde forigis el ĝi Esperanton. El la programo por septembro — decembro 1965 ni citas la jenon: Solena kunveno en la nova klubejo. — Film-vespero (de FIAT kaj pri Danlando). — I.a testamentaĵo de Jan Hus al la hodiaŭo. — K. Ed. Ciolkovskij, aviad-inventisto. — Gajaj kaj tristaj travivaĵoj de Prof. Theodor Kilian kun siaj korespondantoj. — Historio de la kastelo Pernštejn. — Unuiĝintaj Nacioj kaj la Jaro de Internacia Kunlaboro. — Oratora konkurso. — Gregor Mendel, la fondinto de Genetiko. — Batalantoj kontraŭ morto. — Teatra vespero (Leciono pri botaniko. — Ĉe kokokrio. — Multsignifa virino). — Societa vespero. — Solena koncert-vespero honore al la 106-a datreveno de la naskiĝtago de Zamenhof.

Dudince — renkontiĝo de esperantistoj en ĉi tiu sudslovakia banurbeto okazis la 25-26-an de septembro. Kvankam ĝin organizis nur unusola loka esperantisto, s-ano Ernesto Váňa, ĝi tre bone sukcesis kun 63 ĝis 170 ĉeestantoj. La pragramo estis varia kaj agrabla: sabate posttagmeze senpaga banado en la termala baseno de la ŝtata banejo. Poste okazis renkontiĝo ĉe la tendaro, kie la Ĉs. Radio surbendigis intervjuon kun ges-anoj Váňa, Josková el Praha kaj Hubálek el Aŭstrio. Ĉiuj partoprenintoj vizitis ankaŭ la vinbergardenojn sur la proksima montet-deklivo kaj senkoste gustumadis natur-vinon ĉe vinkelo. Kompreneble ekregis gaja atmosfero kaj eksonis belegaj Esperantaj kantoj kaj slovakaj popolkantoj. — Post la komuna vespermanĝo okazis la solena bonvenigo de la gastoj, kiujn salutis s. E. Váňa, k-do Skančik en la nomo de la Kleriga Domo kaj D-ro Wichner, direktor-ĉefkuracisto en la nomo de la Ŝtata Banejo. Apartan mencion meritas la kortuŝaj vortoj de la aŭstria gasto s. Hubálek, same la kantoj de ĉarmaj junulinoj (kun muzikakompano), la kolora Esperanta FIAT-filmo, la prezentado de ĉefŝafpaŝtisto (baĉa) kun fajfilego (fujara). Apartan ĉarmon havis la ĉeesto ĉe bivaka fajro en la tendaro, ĝis noktomezo. — Dimanĉe okazis laborkunveno, kiun salutis la Pola kaj Aŭstria Radioj. Lunde okazis la disaŭdigo de la Ĉs. Radio tra la ondoj de Banská Bystrica, enhavanta la intervjuon.

Gottwaldov. Esperanto-rondeto transiris somere al la Uzina Klubo SVIT, kie ĝi trovis konvenan ejon kaj eblecon kunlabori kun aliaj uzinaj rondetoj (turisma, astronomia). — La regulaj kunvenoj okazas ĉiuvendrede je la 19-a horo, krome grupo da studemuloj kunvenadas ĉiudimanĉe antaŭtagmeze sub gvido de s. Gerža. — La

rondeto prizorgas 6 vitrajn elmontrajn kestetojn kaj du tabulojn pri Esperanto-servo (Hotelo Moskva kaj stacidomo Otrokovice). La servon uzis ne nur en-, sed ankaŭ eksterlandaj esperantistoj (el Pollando, Hungario, Aŭstrio, Latvio k. a s.). — Laŭ instigo de E-rondeto en Šumperk ni kompilas kartotekon de ĉiuj novaj kaj malnovaj esperantistoj en la urbo kaj distrikto. — Por la petskribo al UN ni kolektis 2800 kolektivajn kaj 180 unuopajn subskribojn. — Pri servoj al eksterlandaj samideanoj kaj pri spertoj kun ili prelegis (kun lumbildoj) s-ano Satték el Příbor, pri UEK en Sofio s. Blaha kaj pri migrado tra Slovakio s. Kostíha. S-ano Blaha prelegis ankaŭ al mezlernejanoj pri siaj inpresoj dum la Universalaj Esperanto-Kongresoj, kiujn li partoprenis, krome pri Bulgario kaj ĝia popolo. — La rondetanoj regule partoprenadas la regionajn kunvenojn (Přerov, Čáňtorio, Staré Město pod Sněžkou, Kladsko, Olomouc). — La Someran Esperanto-Tendaron en Lančov frekventis 9 gesanoj kun bona rezulto; s-ano Matulík faris ekzamenon el la kurso D je eminento. — Por la printempo 1966 estas planata ekspozicio de Esperantaj libroj kaj gazetaro.

(Mallongigite laŭ K. Ch.)

Hradec Králové. E-rondeto ĉe Parko de Kulturo kaj Ripozo eldonadas por siaj membroj ciklostilitan informan bultenon en kiu ĝi atentigas pri la ŝanĝo de la tempo de la kunvenoj; nun okazadas ĉiuvendrede je la 19.30 horo. — En la noveembra n-ro troviĝas poemo „Esperanto” de B. Berin el Vilnius kun paralela nacilingva traduko de Miloš Lukáš.

Esperanto-rondeto ĉe Uzina Komitato de Fervojestacio Jaroměř aranĝis, okaze de la Tago de fervojistoj, prelegon por fervojistoj. Partoprenis 50 personoj. Alian prelegon pri Esperanto disaŭdigis la rondet-gvidanto Jaroslav Janák por la publiko en septembro, pere de la loka radio. En Kulturdomo de ČSD okazis ankaŭ interesa prelego, akompanata de 72 koloraj diapozitivoj pri „Domo de Trafiko en Luzerno”. Tiun ĉi prelegon pruntedonis E-rondeto en Havlíčkův Brod, ricevinta ĝin de Svisa Esperanto-Asocio. La prelegon uzis la esperantistoj ankaŭ en aliaj lokoj. — La rondetanoj ekkorespondis pere de sonbendoj kun hispanaj esperantistoj en Sabadell. — Estas preparata prelego de s-anino Milena Nováková el Česká Skalice, kiu helpe de Esperanto travojaĝis la nordajn landojn. La prelego titoliĝas „Per ŝipo ĉirkaŭ Skandinavio”. — En la stacidomo de la urbo Jaroměř troviĝas elpend-kesteto kun diversaj esperantaĵoj por propagandi Esperanton inter multaj vojaĝantoj trapasantaj la stacion. — Dek-fervojistoj aliĝis al skriba kurso de Esperanto aranĝata de E-rondeto en Česká Třebová. La rondetgvidanto almenaŭ unufoje en la monato konversacios kun ili por faciligi ilian lernadon. — La rondetgvidanto vizitis la interesan ekspozicion pri fervojoj kaj trafiko en multaj ŝtatoj, aranĝata de E-rondeto ČSD en Havlíčkův Brod kaj partoprenis la kunvenon de Prepara Komitato de Esperantista Fervojista Sekcio ĉe Ĉs. Esperanto-Komitato la 26-an de septembro 1965 en Česká Třebová.

Jihlava. E-klubo ĉe Domo de Kulturo de Revolucia Sindikata Movado eldonis plaĉan, koloran, presitan agad- kaj prelegprogramon, validan ekde septembro 1955 ĝis marto 1966. El ĝi ni citas la titolojn de kelkaj prelegoj: Mia vojaĝo tra Svedio (L.

Pánská), Rememoroj el Rumanio (M. Lysý), Adriatiko per la okuloj de Ĉeĥoslovakino (A. Svobodová), Muzika vespero kun fremdlandaj popolkantoj (A. Lysý), Interesaĵoj el Izraelo (Š. Pánská), Belaĵoj de Italio (fratinoj Kotal, J. Ďásek), Inter hungaraj amikoj (A. Lysý), Japanio, la lando sub Fudĵi (J. Ďásek), Kion skribis K. Čapek pri Nederlando (V. Povýšil), Bulgario, koro de Balkano (A. Svobodová), Pri la dolĉa Francio (M. Lysý).

Košice. La kunvenoj de E-klubo okazas ĉiulunde je la 17-19 horoj en propra kunvenejo en Domo de Arto en Košice. En 1965 estis efektivigitaj ankaŭ 4 plenkunsidoj kun labor- kaj kulturprogramo. La lastan (22-23 de okt.) partoprenis 40 personoj, inter ili ankaŭ geesperantistoj el Miškolc (Hungario) kaj Zakopane (Pollando). Okaze de la 20-a datreveno de la liberiĝo de nia patrujo kaj Jaro de Internacia Kunlaboro la Klubo aranĝis Esperantan ekspozicion (ekde la 12-a de junio ĝis la 9-a de septembro). La sukceso de la ekspozicio estas merito de ges-anoj Plachý, Zöld, Safko, Babjak kaj Mačurová, kiuj ĝin preparis kaj aranĝis. — La komitato klopodis altiri en la aktivan agadon ĉiujn esperantistojn en la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. Tiucele ĝi eldonadas proprajn ciklostilitajn „Klubajn Informojn“. Inter aprilo kaj novembro aperis 4 numeroj nacilingvaj, dissenditaj al ĉiuj esperantistoj kaj favorantoj en la urbo kaj distrikto. Rezulte de tio la nombro de la klubanoj altiĝis de 78 je 126 personoj. Pere de la bulteno ni helpis ankaŭ al aliaj rondetoj en Orientslovaka Regiono kaj kontribuis al la kreo de novaj E-rondetoj en la urboj Spišská Nová Ves, Prešov kaj en la vilaĝo Cernina.

Liberec. Esperanto-klubo ĉe PKR okazigis la 27-an de marto societan vesperon (pluaj informoj mankas).

Martin. El la atingajoj da E-rondeto de Kulturdomo de Revolucia Sindikata Movado de Maŝinfabrikejoj de Turiec ni menciis la eldonon de 6 numeroj de neregula kluba informilo Esperanto-Agado, plue eldonon de poŝtkartoj kun dulingva teksto, tradukon kaj eldonon de esperantlingva faldprospekto por Muzeo de Slovaka Nacia Revolucio en Banská Bystrica, (ankoraŭ en kunlaboro kun E-rondeto Grafia Jihlava, kie la faldprospekto estis presita). Ni partoprenis la renkontiĝojn aranĝitajn de aliaj rondetoj (Zvolen, Žiar), kaj la 12-13-an de junio ni aranĝis renkontiĝon de esperantistoj en Martin en la nova konstruaĵo de Uzina Klubo (nun jam Kulturdomo). — La kulturprogramo estis pliriĉigata per vizito de la bild-galerio de esperantisto, nacia artisto Martin Benka kaj la inaŭguro de „Esperanto-vilao“ de D-ro Ludoviko Izák. La samtempe instalita Esp-a ekspozicio prezentis multe da plej variaj esperantaĵoj, eĉ unikaĵaj. Partoprenis 50 personoj, inter ili multaj gastoj el Slovakio kaj Moravio. — La rondeto dum kelkaj tagoj gastigis ges-anojn de Jong el Nederlando kaj ĝia ano s. Škamla partoprenis la Internacian Junularan E-Tendaron en Katowice (Pollando), dum Štefan Špigút ĉeestis la II-an Internacian Pedagogan Seminarion en Szeged (vidu apartan raporton). — La rondetgvidantaro intime kunlaboras kun ĈSEK: Aŭgusteno Čambál estas ĝia vicprezidanto, D-ro Ludoviko Izák redaktoro de Informoj de ĈSEK.

ESPERANTO-RONDETO OSTROJ.

Opava. La rondeto sukcese daŭrigas la propagandon de la verkaro de Nacia artisto Petr B e z r u č . La broŝuro pri la Majstro, aperinta aŭtune 1965 estis dissendita en la tutan mondon. En Memordomon de P. Bezruč nun daŭre alvenadas eksterlandaj resonoj. La plej multaj skribintoj raportas, ke nek la poeto nek lia verkaro estas ĉe ili konata kaj tial ĉiuj ĝoje akceptas la publikaĵon. Ĉiuj skribintoj esprimas la esperon, ke baldaŭ aperos en Esperanto la tuta poemkolekto de Bezruč — Sileziaj kantoj. Grava rezulto estas, ke laŭ la publikaĵo aperis kelkaj raportoj pri la poeto en pluraj nacilingvaj presaĵoj, inter ili ankaŭ en la malta lingvo.

Por subteni la bone disvolviĝantan turistikon, la ŝtata eldonejo Orbis eldonis reprezentan publikaĵon pri la urbo Opava. La tekstoj, akompanantaj la fotografiaĵojn estas ankaŭ en Esperanto (la tradukon prizorgis la anoj de nia rondeto). Ni do penas, ke nia lingvo estu en nia urbo praktike uzata.

Interesuloj pri la broŝuro „Opava” povas sin turni al nia rondeto, kiu sendos ĝin al ĉiu. La prezo estas 30 Kčs plus sendkostoj (ĉe unu ekz. Kčs 3.—, ĉe pli da ekz. Kčs 5.—).

V. K.

Piesok. La 7. an de julio 1965 estis fondita E-rondeto ĉe Uzina Klubo de RSM de Maŝinfabrika en Piesok. Ĝia gvidanto estas D-ro Vlastimil Nekuda, uzina kuracisto (adreso E-blok, PIESOK, poŝta Podbrezová), iama ano de Esperanto-Klubo en Brno, kiu diligente partoprenadas la kunvenojn kaj esperantistajn renkontiĝojn de aliaj rondetoj kaj presone helpas al la jam ekzistantaj aŭ estiĝontaj rondetoj en la distrikto. En la uzina gazeto „Piesocký strojár” (Maŝinisto de Piesok) regule publikigadas sciigojn pri la agado de la rondeto kaj novaĵoj en la Esperanta mondo. Krom tio la rondeto zorgas ankaŭ pri konstanta ekspozicio kun interesaĵoj el la tuta mondo.

Písek. E-rondeto ĉe Uzina Klubo de RSM JITEX aranĝis ekskurson al la Pola maro la 13-18-an de julio 1965 (pluaj sciigoj pri la agado mankas).

Poděbrady. E-rondeto de UK de RSM de Ĉs. Ŝtataj Banejoj okazigis la 18-an de decembro sukcesan Zamenhofan vesperon. La tradicia VI-a renkontiĝo de esperantistoj apud la rivero Labe okazos la 5-12-an de junio 1966. Por la duonjaro 1966 la rondeto jam nun anoncas jenajn prelegojn: Pri la 48-a UEK en Sofio (kun lumbildoj). — La sunoplana Italio (lumbildoj). — Rememoroj pri Nederlando (filmprezentado). — La estonta kongresurbo Budapeŝt (lumbildoj). — Travivaĵoj dum la 50-a UEK en Tokio (filmo).

Polička. La nova E-grupo ĉe Unueca Klubo de Laboruloj estis fondita la 16-an de marto 1965. Ĝia gvidanto fariĝis la 23-jara František Raušar. La grupo havis 12 membrojn-komencantojn, kiuj finis la elementan kurson en Svitavy kaj estas plejparte 16-25 jaraj. Pluraj anoj komencis lerni, do la nombro altiĝis je 20. — La 2-an de majo okazis en Polička la unua kunveno kun partopreno de esperantistoj el Česká

Třebová,- Litomyšl, Svitavy (35 ĉeestantoj). En la kultura programo i. a. la plej bona loka esperantistino - (s. Žahourková) prelegis pri la 700-jara urbo Polička. Krome okazis lingva konkurso kun migranta trofeo „Verda Ŝlosilo”, kiun ĉi-foje gajnis komencantino s. Kotizová. La ĉeestantoj vizitis ankaŭ la naskiĝĉambron de eminenta komponisto Bohuslav Martinu, troviĝanta en la preĝeja turo, ĉar lia patro estis simpla ŝuisto kaj turgardisto.

Poprad. E-rondeto ĉe UK de Vagonfabriko Tatra (ZK ROH Vagónky Tatra) estis fondita en oktobro 1964, sed ekfunkciis en februaro 1965 per lingva kurso. En septembro okazis pluaj kursoj: por komencantoj kaj por progresintoj, post ekspozicio de esperantaĵoj. La rondetkunvenoj estas buntigataj per Esperantaj kantoj k. a. programo, por kio oni povas uzi la uzinan magnetofonon. Krom tio per legado de Informoj de ĈSEK oni konatiĝas kun la agadformoj de aliaj rondetoj en nia respubliko kaj pere de eksterlandaj gazetoj ankaŭ pri la tutmonda esperantismo.

Šumperk. E-rondeto ĉe Unuiĝinta Uzina Klubo de RSM aranĝis la 18— 19-an de septembro renkontiĝon de esperantistoj el Orientbohemia kaj Nordmoravia Regionoj, en Staré Město pod Sněžníkem. Post la programo en la loka hotelo Sněžník sabate posttagmeze kaj vespere, dimanĉe okazis tutaga ekskurso al la monto Sněžník. — La 9-10-an de oktobro estis aranĝita aŭtobusa ekskurso al la internacia esperantista renkontiĝo en Klodzk kaj Bystrzica Klodzka en Pollando.

Třinec. E-rondeto ĉe UK de RSM de Ferfabriko okazigis laborkunvenon en la Metilerneja resanigejo en Nýdek, sabate la 26-an de junio posttagmeze, kaj dimanĉe tuttagan ekskurson al Ĉantoria en la Beskyd-montaro. La vetero estis belega. — Laŭ la letero de M. Bartovská la rondeto organizis aŭtobusan ekskurson en Hungarion por neesperantistoj sub modelaj aranĝoj kaj gvido de s-anino A. Milatová el Třinec. Partoprenis ankaŭ 4 anoj de E-rondeto en Frýdek-Místek. La ceteraj eskursantoj povis plene konvinkiĝi pri la utileco kaj dumvojaĝa utiligebleco de la Lingvo Internacia, kaj multaj el ili decidiĝis ĝin eklerni. Precipe la belega medio de la kursoj en la resanigejo de la hungaraj fervojistoj en Balatonkese certigis por si kelkajn el inter ili por la venonta somero. La esperantistoj en Solnok (kie la eskursantojn oficiale akceptis la direktorino de la Kulturdomo), kaj en Budapeŝt, perfekte zorgis, ke al la gastoj manku nenio kaj povu ekkoni plej multe da naturbelaĵoj de Hungario. Tiel la 51-a UEK en Budapeŝt 1966 fariĝis ankoraŭ pli alloga.

Vsetín Ohrada. E-rondeto transiris al la UK de RSM de „Sklář” (Vitrafisto). La fonda kunveno okazis la 30-an de aŭgusto kun partopreno de 24 membroj kaj 3 delegitoj el Ostrava kaj Bojkovice. Estis elektita jena gvidantaro: Aleš Berka, Med. D-rino O. Poláčková, D. Schedlbauer, J. Ficek, V. Doležalová, O. Jiránek, O. Kovář kaj Fr. Ptáček. — La rondeto tuj ekkontaktiĝis kun esperantistoj en Valašské Klobouky, kie montriĝas ebleco fondi E-rondeton. — Krom kursoj kaj partopreno en aranĝoj de aliaj E-rondetoj estis okazigita la 13-an de septembro publika prelego: Eseranto en la vivo de la moderna homo kaj en la literaturo.

Zvolen. E-rondeto ĉe Kultura kaj Societa Centro aranĝis la 14-15-an de aŭgusto renkontiĝon de esperantistoj, kiun partoprenis ankaŭ gastoj (Karol Cibur el Rimavská Sobota, Ján Tichoň el Bojkovice kaj Francaj esperantistoj: k-do L. Pannier kun sia familio. La renkontiĝon gvidis s-anoj Fr. Hropko kaj Kolba. En la nomo de Ĉs. Esperanto-Komitato salutparolis Aŭgusteno Ĉambál, ĝia vicprezidanto, kaj en la nomo de la redakcioj „Informoj de ĈSEK" kaj „Esperanto-Agado" D-ro Ludviko Izák. — Dimanĉe okazis ekskurso al la mondfama ban- kaj kuraĉloko Sliač, kun promenado kaj gustumado de mineralakvo kaj aŭskultado de banloka orĥestro. Oni vizitis ankaŭ ŝafpaŝtistan kabanon kaj gregejon kun gustumado de „strapačky" (ŝirbuletoj kun mola fromaĝo — bryndza).

Kelkaj rondetanoj partoprenis la tradician 4-an renkontiĝon en Solnok (Hungario), en aŭgusto 1965. Ĝi konsistis el riĉa programo: krom lingva perfektigo ĝi enhavis ankaŭ ŝip-ekskurson sur la rivero Tisa, vizitojn en la historia urba muzeo kaj en la galerio, bivakan fajron kun internaciaj popolaj ludoj kaj dancoj. Ĉeestis ankaŭ esperantistoj el Bulgario, Sovetunio, Jugoslavio, Pollando kaj Belgio. Kvankam la partoprenintoj devenis do el sep nacioj, ili parolis per ununura lingvo, la lingvo de paco kaj amikeco — Esperanto.

ZPRÁVY ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU — INFORMOJ DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO - KOMITATO. — Vydává — Eldonas: Osvětový ústav v Praze, Blanická 4, Praha 2. Řídí redakční kruh — Redaktas la redakta komitato: J. Cíhová, Dr. L. Izák, O. Kníchal, F. Sviták, E. V. Tvarožek. Tisk — Preso: TSNP Martin V-15*61041